
# NIA  PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**APRILO/JUNIO 2021** **Nro. 127 (2/21)**

Esperanto
Jokohama

Stranga frontopaĝo por bilbaoanoj, ĉu ne?

Sed tiel ke, pro pandemio, aktivado en nia E-rondo ne normaliĝas, ni volas gratuli al niaj geamikoj de Jokohamo pro regula sendo de ilia gazeto "Novaĵoj Tamtamas" kaj dediĉi al ili tiun-ĉi etan omaĝon.

Post vizito de kelkaj el ili al la E-Grupo de Bilbao, antaŭ kelkaj jaroj, ni daŭre ricevas rete tiun interesan bultenon el malproksima lando. Koran dankon.

Inter la lastaj novaĵoj ricevitaj, ni elstarigu la inaŭguron de "Esperanta Muzeo Jokohama" la 23an de aprilo 2021. Sur la apuda foto videblas reklamŝildo flanke de la fervoja linio –kion vidos praktike nur la trajnpasaĝeroj. En la fino de aprilo oni instalis reklamŝildon al la muro de la verando, kiun vizitantoj al la Muzeo facile trovos.



# LOKE ...


## “E-vendejo” en Portugalete.

Jen “E-vendejo” trovita en la bela kaj historia urbeto Portugalete (13 kilometrojn norde de Bilbao). Ĝi lokiĝas en unu el la plej konataj kaj trairataj stratoj de la urbo, la tiel nomata “El Ojillo” (pr. El oĥíjo) (“La okuleto”), malgraŭ ke ĝia oficiala nomo estas “Gregorio Uzquiano” (pr. Gregório Uzkiáno), nomo tamen preskaŭ nenies sciata.




La stranga nomo de la vendejo, “Sango”, tute ne rilatas al ĝia aktivado ĉar kiel eblas vidi sur la foto, ĝi okupiĝas pri vendado de vestoj.

## Ni denove renkontiĝas en la Grup-ejo.




Iom post iom la KOVIM-19 ŝajne malfortiĝas danke al amasa vakcinado, almenaŭ en la landoj kun plej da rimedoj.

Profitante la favorajn kondiĉojn, jam de antaŭ kelkaj semajnoj ni komencis denove renkontiĝi ĉe nia Grupejo. Kiel kutime, la **vendredojn, inter la 19:30 kaj la 21:00 h.** Tie, krom renkonti malnovajn geamikojn, vi trovos la eblon praktiki Esperanton ĉar la ĉeestantoj plejparte ne krokodilas.

Do, ni atendas vian viziton antaŭ nova fermo, ĉi-foje pro somerumado.

# H.E.F.

## Ĝenerala HEF-kunveno.



Laŭ kunvoko de la estraro, la dimanĉon 6an de junio oni okazigis la laŭleĝan devigan ĝeneralan kunvenon de HEF.

Pro la nunaj cirkonstancoj, ĝi estis virtuala (vidu apudan foton), pere de Skajpo. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 30 homoj kaj, inter aliaj aferoj, oni aprobis la spezokonton de 2020, la buĝeton por 2021 kaj la memuaron pri aktivadoj dum 2020. Ankaŭ oni decidis ne ŝanĝi la kotizojn por 2022.

**LOKE ...**

## Iom da historio…



Fiesta Esperantista en San Sebastián. Grupo de los reunidos en ella

Rigardante malnovajn fotojn, ni trovis tiun-ĉi supran, kiu aperis en la ĵurnalo “El Nervión”, de Bilbao (30/08/1908) sub la titolo “E-festo en San Sebastián. Grupo de kunvenintoj”. Inter la ĉeestantoj, la ĵurnalo mencias al Sroj. **Garrido** kaj **Pérez Alcorta**, de San Sebastián; **O. de Allende**, de Bilbao; **Dr. Hita**, de La Arboleda (Bizkajo) kaj Sroj. **Berdonces** kaj **Mas**, de Santurce (Bizkajo). De ĉiuj el ili ni kapablas rekoni nur al Olegario de Allende, en la centro de la dua vico, kun nigra barbo.

Eble ne tro konata estas la fakto ke, por la Universala kongreso de la jaro 1909, okazinta en Hispanio, la tiama “Hispana Societo por Propagando de Esperanto”, fondita en 1903, pensis pri la urbo San Sebastián, sed finfine Sro. Garrido, Prezidanto de la tiea loka rondo, rezignis pri tio. La kongreson oni okazigis en Barcelono, kun ĉeesto de Zamenhof … kaj ĝis la lasta momento tiu okazigo ne estis certa, ĉar nur kelkajn tagojn antaŭ la malfermo, estis ege seriozaj tumultoj sur la stratoj de la urbo, en la tiel nomata “tragika semajno de Barcelono”. Aŭtoritatuloj decidis puni la supozatajn instigantojn de la protestoj kaj, inter ili, estis pafekzekutata la fama pedagogo kaj esperantisto Francisko Ferrer i Guardia.

**H.E.F.**

## HEJS atingis 1.000 sekvantojn en instagramo.




Laŭ informis la junuloj de HEJS (Hispana Esperantista Junulara Sekcio) pere de ilia Prezidanto, ili sukcesis atingi 1.000 sekvantojn de lia konto en la socia reto instagramo. Specialan gratulon al William Guerrero, HEJS-Prezidanto, kaj al Jorge Brasal, stipendiulo laboranta en HEF.

**H.E.F.**

## E-kurso por hispanparolantoj.




¡Novedad!: nuevo curso de esperanto para hispanohablantes, gratuito, virtual y tutorizado. En colaboración con
Esperanto Colombia
Dos sesiones de dos horas a la semana. Ahora tienes un horario más conveniente para estudiantes españoles: los miércoles y sábados entre las 19:00 y 21:00, hora peninsular. Más detalles:
https://www.esperanto.es/hef/index.php/438

Atentu, nova virtuala kurso por hispanlingvanoj, kunlabore kun
Esperanto Colombia
Nun kun horaro plej konvena por lernantoj el Hispanio. Vidu detalojn ĉe:
https://www.esperanto.es/hef/index.php/438.

Kun la helpo de Hispana E-Federacio (HEF), Universala E-Asocio (UEA) kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

## UNED – Nun liberaj ekzamenoj .




Se vi necesus oficialan diplomon pri via E-nivelo kaj ne deziras sekvi kompletan kurson nun eblas prezentiĝi al liberaj ekzamenoj de UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia-Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado). Enskribiĝo eblis ĝis la 12a de majo, sed certe oni malfermos novan aliĝperiodon. Kaj eblas tion fari ankaŭ el eksterlando, nur kondiĉe ke vi aĝas pli ol 18 jarojn.

Nuntempe, UNED kunlabore kun HEF proponas oficialajn kursojn de Esperanto por la niveloj A2 kaj B1 laŭ la eŭropa referenckadro.

Pliaj informoj hispanlingve en: http://portal.uned.es/portal/page?_pageid=93%2C61497207...

## Virtuala hispana kongreso.

La estraro de Hispana Esperanto Federacio anoncis la unuajn preparojn por la 79a Hispana Esperanto Kongreso. Estis decidite okazigi la kongreson la tagojn **2an kaj 3an de oktobro 2021**, pere de iu reta platformo, ankoraŭ elektota.

La provizora programo enhavos, inter aliaj, prelegon de Duncan Charters, du libro-prezentadojn, blokon da prelegoj sub la temo “Scienco kaj Esperanto”, filmeton kun pecoj el kelkaj pasintaj kongresoj, kompilo de ŝercoj en Esperanto cirkulantaj tra la sociaj retoj, kaj membro-kunvenon.

**H.E.F.**

## Nova ret-versio de la vortarego Hispana-Esperanto.

La Granda Vortaro Hispana-Esperanto (enhavanta proksimume 50.750 kapvortojn) sendube estas la vivo-verko de **Fernando de Diego** (1919-2005), ĵurnalisto kaj filologo, tradukisto kaj aŭtoro ankaŭ de eseoj pri la arto traduki kaj la literatura kritiko.

La informadika skipo de Hispana Esperanto-Federacio prilaboris novan ret-version de la *vortarego*. La malnova versio funkciadis dum multaj jaroj, kaj oni kreis ĝin siatempe nur kiel simplan eksperimenton, sed la tempo-paso montris, ke ĝi estas unu el la plej uzataj ret-servoj de HEF.

En tiu malnova versio abundis teknikaj problemoj, la uzado ne estis aparte komforta kaj mankis kelkaj nuancoj de la originala verko en la datumbazo, neniam aktualigita aŭ korektita. La nova programo disponigas al la uzantoj aron da novaj plibonigoj, kiujn vi esperebIe taksos valoraj:


- Korektita kaj aktualigita datumbazo kun ĉiuj originalaj trajtoj de la vortaro.
- Aŭtomata sugesto de ebloj dum serĉado de vortoj en la hispana.
- Prezento de vortoj similaj al tiu serĉata.
- Eblo traserĉi ajnan vorton aŭ esprimon (en la du lingvoj) ene de la difinoj.
- Virtuala klavaro kun esperantaj supersignitaj literoj kaj specialaj karaktroj de la hispana por faciligi la serĉadon per ĉiuj klavaroj.
- Pli bela aspekto kaj pli intua kaj facila interfaco.
- Adaptiĝo por telefonoj kaj tabeletoj.

Ni ŝatus ricevi viajn opiniojn, tiel ke ni povos iom post iom korekti eventualajn erarojn kaj plibonigi la programon. Vi povas kontakti la skipon ĉe esperanto@esperanto.es.

La adreso de la vortaro daŭre restas la sama: https://www.esperanto.es/diccionario.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 73. Apr. 2021)*

## Datrevenoj de du elstaraj hispanaj esperantistoj.



La 23an de marto 2021 oni kunmemoris la 100an datrevenon de la naskiĝo de la hispana esperantisto Antonio Marco Botella, kiu forpasis 99-jaraĝa la pasintan 3an de novembro. Kiel omaĝo, Fondaĵo Esperanto publikigis rete lian lastan verkon, la tradukaron "Hispana Lirika Antologio", libere alireblan en la Bitoteko de HEF.



La 14an de aprilo oni memorigis la 75an datrevenon de la forpaso de unu el la plej famaj esperantistoj en la komenco de la pasinta jarcento: la respublikista kolonelo Julio Mangada Rösenorn, kiu dum multaj jaroj estis prezidanto de la tiama Hispana Esperanto-Asocio. Kun tiu okazo, la retejo Militrakonto publikigis ampleksan artikolon pri li, verkitan de Toño del Barrio. Eblas ĝin legi ĉe: mondmilito.hypotheses.org/4320.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 73. Apr. 2021)*

## TRA LA MONDO …

### Gluteno+Glifosato=herbicido kiun ni manĝas kaj trinkas.

Por planti tritikon „dura“ en pli nordaj regionoj necesas rapide maturiĝanta tipo de tia greno. Oni ŝprucas glifosaton ne nur por mortigi ĉiajn trudherbojn, sed ankaŭ por sekigi la spikojn nur je mallonga tempo antau la rikolto. Ne-mirinde ke en biero aŭ en farunaj produktoj pli ofte troviĝas glifosato.

Monsanto ja ĉiam diras ke ĝi ne influas nian sanon. EFSA, la Eŭropa Instanco pri Sekureco de Nutraĵoj nur formale kontrolis la prezentitajn dokumentojn. La esploroj estis menditaj de Monsanto (la produktanto de Glyfosat). Sed Monsanto ne interesiĝis montri sano-problemojn.

Bedaŭrinde la EU-komisaro V. Andriukaitis ne povis malpermesi denovan tempodaŭron por la uzado de glifosato. Necesus ke EFSA mem organizas kaj saĝe elektas kiajn esplorojn oni faru por havi salubrajn nutraĵojn - por brutaro kaj homaro. Kompreneble Monsanto ne estas la sola firmao kiu neglektas la sanajn sekvojn de siaj produktoj.

Nia mikrobiomo - la bakterioj en nia intesto - estas endanĝerigata de glifosato, ĉar tiu havas samajn ankrojn en proteinoj kiel Glycin (glicino - la unua el la 20 bazaj aminoacidoj, surbaze de kiuj la vivo funkcias).

Krome unu el la aditivoj en la vendata glifosato „Round Up“ estas N-fosfonometilglicin, kiu ankaŭ ĝenas la celulojn de nia intesto, tiel ke tie sekvas lokaj inflamoj kiuj kaŭzas la sano-problemojn.

Por produkti bonan panon oni bezonis multe da tempo; dum tiu tempo la gluteno estas reduktita. Sed modernaj bak-firmaoj ne lasas tiom da tempo pro maturigo de la pasto; tial pli da gluteno restas en la pasto ol antaŭ 20-30 jaroj. Tiaj industriaj pastaĵoj enhavas malpli da valoraj spuraj metaloj kiel Zinko, Fero, Mangano, Magnezio kaj Kobalto.

Kune ĉi-tiuj malbonaj parametroj „rezultigas“ ke pli kaj pli da homoj suferas de celiakio; esploroj eĉ montris ke aŭtismo kaj demenco same plimultiĝis.

Dokumenta filmo de 79 minutoj „Gluteno la malamiko en via pano“ estas videbla kaj aŭskultebla en la franca kaj germana, subtitolita en la itala kaj hispana.

https://www.arte.tv/fr/videos/090077-000-A/gluten-l-ennemi-public/

https://www.arte.tv/de/videos/090077-000-A/gluten-der-feind-in-deinem-brot/

*(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj)*

### Perdita perlo nur retrovita.




En la klimaksa danco-scenejo en la kinofilmo “Survoje al Singapuro”, de Bob Hope/Bing Crosby (1940), la indiĝenoj de Kaigoon kantas en Esperanto:

https://youtu.be/mlha035AiOs

*(María Zocato. 09/03/2021)*

# TRA LA MONDO …

## Sukcesoj en rilatoj kun UNESKO kaj MOS.

UNESKO unuafoje aperigis retan enketon en Esperanto, por kolekti vidpunktojn por baldaŭa raporto pri edukado. Ĝis meze de aprilo pli ol dumil homoj plenigis la enketilon el ĉiuj mondopartoj. La limdato estis la 30a de aprilo.

Aliflanke, la Monda Organizaĵo pri Sano de Unuiĝintaj Nacioj (MOS) anoncis la pretigadon de reta kurso “Enkonduko pri KOVIM-19: metodoj por detekto, prevento, reago kaj kontrolo”, tradukita al Esperanto en kunlaboro kun la asocio de medicinistoj UMEA kaj UEA. La adreso estas: https://openwho.org/courses/enkonduko-al-KOVIM-19. La kurso donas ĝeneralan enkondukon pri KOVIM-19 kaj novaperantaj spirvirusoj, kaj ĝi celas profesiulojn pri publika sano, administrantojn de okazaĵoj kaj homojn kiuj laboras por Unuiĝintaj Nacioj, internaciaj organizaĵoj, NRO-j kaj iu ajn persono kiu interesiĝas pri la temo. Lerncelo estas priskribi la fundamentajn principojn de novaperantaj spiraj virusoj kaj kiel efike reagi al eksplodo, kaj la kursodaŭro: ĉirkaŭ 3 horoj. Atestilo de sukceso estos havebla por partoprenantoj, kiuj akiris almenaŭ 80% de ĉiuj poentoj disponeblaj tra ĉiuj tekstoj.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 73. Apr. 2021)*

## DEBATO PRI LA ESTONTO DE EŬROPO.

Ĉu esperantoparolantoj apogas proponojn favorajn al nia lingvo en la kadro de la Eŭropa Unio? Se tiel, ni uzu la eblecon partopreni la civitanan dialogon, kiu estis oficiale lanĉita antaŭ kelkaj tagoj kadre de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo.

Kiel elemento de la Konferenco la eŭropuniaj civitanoj estas invitataj proponi kaj diskuti ideojn, kiamaniere la EU evoluu.

La Eŭropa Komisiono starigis platformon por tiu civitana kundiskuto, pere de la retejo: https://futureu.europa.eu/ (havebla en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU). Kelkaj proponoj jam afiŝitaj rilatas al la lingva reĝimo de la EU (komuna lingvo, lingva justeco, ktp.). Kelkaj el ili pledas por la uzo de Esperanto.

La eŭropaj E-asocioj proponas ke oni koncentriĝu sur la plej apogataj, kaj inter ili, oni povas speciale atenti tiun proponitan de esperantisto el Onubo (Huelva), kun la anglalingva titolo: “Esperanto, a common and neutral language, designed to be easy to learn. A new tool for a more united European Union”. Ĝi estas nun la plej voĉdonata en la sekcio “Aliaj ideoj”. Trovu ĝin en la ligilo:

https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399.

*(“Nia Voĉo”, órgano de Madrida E-Liceo. 01/06/2021)*




## E-kursoj en la kastelo Greziljono-Francujo.

Sep tagoj: 23 jul./02 aŭg.

Tri niveloj: Baza (komencantoj kaj komencintoj), meza (B2-C1) kaj altnivela (C1-C2).

Prezoj: 9€/tage. Memzorganto en tendejo. Kurso+aktivaĵoj+ tendejo.

279€ - 472€. Ĉioinkluziva. Kurso+aktivaĵoj+loĝado en ĉambro de la kastelo (1 aŭ 2-lita) + manĝoj (en tendejo 246€).

Vegetarana manĝado eblas.

**TRA LA MONDO …**

## Esperanto-Numismatika Asocio



Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 147 individuaj membroj kaj 22 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston! Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare). Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

*(Bert Boon, iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”. bert.boon@skynet.be. 03/06/2021)*

## Itala kongreso en Assisi. 20-27 aŭgusto 2021.

Covid kreis problemon – la kongresa hotelo fermiĝis kaj ne plu malfermiĝos – sed tio ne estas problemo, ĉar, dank’ al tio, ni pli bone serĉis kaj trovis eĉ pli bonan solvon.

Tiuj el vi kiuj ĉeestis la TEJO-kongreson en 1997 en Assisi – kun rekorda nombro da partoprenantoj, 497 – certe ankoraŭ memoras pri la kongresejo. Ĝi nun estas bonega hotelo, 4-stela, sed konservis ĉiujn belajn trajtojn - la panoramon videblan de la ĉambroj, la ĝardenon, la portikojn, la proksimecon al la fervoja stacidomo -.

Jes, vi tuj divenis ke ĝi estos la sidejo de nia kongreso – Hotel Il Cenacolo. Do tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis, ne hezitu : ni atendas vin.

La Kovida situacio estas multe pli bona kaj la hotelo garantias ĉiujn necesajn sanigajn servojn. Do tuj al : kongreso@esperanto.it kaj legu ĉion.

*(Por LKK, Michela. 21/05/2021)*